

& Por la tria eldono de "Legendoj":

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 341 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Mikaelo Bronŝtejn (2006). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado.>

(#Melodio:

<:31> (

/mi mi dore mi mimi mimido re fa;fa mimimi mimimi mimido re fa;

(#Rekantaĵe: mire do; do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi re do)

)×11)+

(&Strofoj:

'1 Sendube, eĉ se kelknuance subtilaj, ;
la novaj "Legendoj" ja ŝajnis utilaj

(×: **En la ĉen'** ; **Dancu nun trankvile** ;
Ĉiuj ni trankvilas ; **Jen en amika**
ĉen' ; **Dancu nun trankvile.**)

'2 almenaŭ al mi, la aŭtor' nemodesta, ;
ĉar min impetigis la Into honesta.

'3 Post kiam cent homoj ĝin legis,
kotopo, ; jam samopinias almenaŭ
triopo,

'4 sendinta flataĵojn, sed ne sen kritikoj.
; Respondu mi nun: – Koran dankon,
amikoj!

'5 Ho ve! Senhezite forrajdas la tempo:
; Mi, kun la natura sincer' kaj sentem',
po

'6 dek rubloj vendata en falso ekrana, ;
ja ŝajnas person' absolute lontana

'7 de l' nuna epoko, de l' juna medio, ;
malmoda. Sed plu konvinkita pri tio,
.....

'8 ke nin la juneco ne vane ekzaltis, ; ke
l' baroj obstinaj ja iom dissaltis

'9 per nia fervoro kaj nia espero. ; Nu,
eble, nevane nin tenis la Tero,

'10 kaj la juna gent', krom la lingva
belego, ; ricevas ĉi libron por hasta
tralego –

'11 sen duraj ordonoj, kun nur
rekomendoj ; alude humilaj – ja estas
legendoj...)